


Eŭropa Bulteno

Majo 2019, Numero 192

ITALA ESPERANTO-KONGRESO 2019



Itala Kongreso de Esperanto en Triesto okazos ĉe la nordorienta limo de Italio. Triesto fariĝas ĉiam pli alloga por multegaj turistoj ankaŭ eksterlandaj. Promenante en la urbocentro oni renkontas plurajn grupojn kun nazo direktita iom alte por admiri la belegan Liberty - arkitekturan stilon de pluraj imponaj palacoj. Eble ili demandas sin ĉu oni estas en Italio aŭ plene en Mezeurolo kun iom da viena spico.

Multfaceta estas la historio de tiu ĉi urbo, kun pluraj tragikaj eventoj en la jaroj ekde 1900. Triesto nun estas tre bela, interesa, plena je eventoj kiuj sin postkuras unu post la alia: la evento de antaŭ kelkaj tagoj temis pri plonĝado saltante el 27 metroj de alteco, de la granda, fortika kaj alta flosanta pontono sur kiu troviĝas gruo nomita "Ursus", konstruita en la



jaro 1913. Ursus estas alta 70 metrojn kaj utiligita por multnombraj havenaj laboroj ekde sia naskiĝo inter kiuj la elakvigo post la dua mondmilito de subakvaj ŝip-restaĵoj kaj de submaraŝipoj, kun la risko pri eksplodoj de la abundaj minoj. La flosanta pontono de Ursus pezas entute 2008 tunojn el ŝtalo, ĝia platformo estas longa 53,67 metrojn kaj larĝa 23,93. Ĝi havis plurajn ejojn dividitajn je loĝejoj por la laboristoj (16 personoj), deponejoj kaj ejo rezervita por la

necesa maŝina aparataro. La gruo povas movi kaj transporti 150 tunojn kaj havas lignan dometon de kie oni manovras la gruan brakon, la propulsadajn motorojn kaj la rudrojn de la platformo. La historio de tiu ĉi objekto de arkeologia industria branĉo, estas tre longa, ĝi trairas ĉiujn okazintaĵojn de ĝia finkonstruo, do dum naudeko da jaroj. La evento kioam naĝas mare de la 27-metra Ursus allogas multajn plonĝistoj el diversaj mondopartoj, sed pro la malbona vetero (pluvado, nuboj, vento, ne tro alta temperaturo) nur 5 kuraĝis montri sian kapablon per komplikaj plonĝiloj montri sin al la mutnombra publiko, kiu sub ombrejoj spektis la prezenton kaj varme aplaudis la sportistojn.

Serio da eventoj - kulturaj, sportaj, komercaj, turismaj, eĉ dancaj - plenigas la tutan someron kaj la hotelajn kapacitojn. Pro tio rapide interesiĝu pri loĝado dum la kongresa semajno al kiu oni aldonos du tagojn dediĉitajn nur al ekskursoj. Iru al la paĝo:

<https://kongreso2019.esperanto.it/logxado/> . Tie vi trovos la hotelan oferton, ne hezitu kontakti la organizantojn (nored@tiscali.it) por detaloj kaj eventuale pri kundivido de hotelĉambro kun alia kongresano.

La kongresa programo estos tre riĉa, oni pritraktos plurajn temojn: de Leonardo da Vinci, okaze de la 500-jara datreveno de lia morto, al politiko de Euxropa Unio pri instruado de lingvoj kaj la projekto de EEU pri nova lingva instrumentado por infanoj de bazlernejoj, de multlingvismo kaj multkulturismo al Unesco-agado kaj al Unesco Kuriero eldonita ankaŭ en Esperanto, de Ĉigongo matene - ĉina gimnastika saniga metodo - al Lego-Robotiko por infanoj kaj geknaboj, de monodramoj al muziko moderna kaj klasika. Krome eblos admiri la belecojn de la Regiono per pluraj ekskursoj.

Por profiti de ĉio ĉi, aliĝu laŭeble urĝe. Mendu vian loĝadon kaj ekskursojn, kaj.... preparu vian valizon!

Edvige Ackerman

EŬROPA KONFERENCO KAJ KUNSIDOJ DE ASEMBLEO DE EEU



Ni ripetas ĉi tiun artikolon el la pasinta numero por rememorigi vin pri ĉiuj detaloj.

Konsideru ke ankaŭ mi venos kvankam pro pulmomalsano mi devous daŭre havi oksigenaparaton kaj tie mi ne povos. Do, mi riskos pro ĉi tiu grava aranĝo.

La Konferenco de EEU pri la temo: »Multlingva Politiko de EU en lernejoj« okazos de la 25a ĝis la 27a de aŭgusto 2019 en Triesta hotelo Savoia

Excelsior Palace. Jen la programo de la konferenco:

Dimanĉo, la 25-an de aŭgusto:

09.30 - 11.30 Salono TERGESTE - Oficiala inaŭguro. Interveno de Vytenis Andriukaitis, komisionano de Eŭropa Unio - Esperanto kaj lingva justeco en Eŭropo.

14.30 - 16.00 Salono EXCELSIOR - EEU-Estraro kun Vytenis Povilas Andriukaitis

17.30 - 19.30 Salono EXCELSIOR - EEU-Seminario

1) Seán Ó Riain - Irlandaj spertoj de lernado de dua lingvo en bazaj lernejoj ekde 1922: kiel plibonigi la rezultojn?

2) Zlatko Tišljarić - Rezultoj de la projekto “Multlingva Akcelilo”, kiun financas Eŭropa Komisiono per sia fonduso Erasmus+.

Lundo, la 26-an de aŭgusto

09.00 - 12.00 Salono IMPERATORE - EEU-Seminario

1) Jozef Reinvart - Vademecum de multdisciplina projekto: Movebleco kaj inkluziveco en multlingva Eŭropo.

2) Michele Gazolla - Lingva politiko kaj lingva justeco en nuntempa Eŭropo

La Asemblea publika kunsido de EEU dediĉas sin al novaj perspektivoj por E en EU kaj al agnoskoj de Esperanto-kulturo kiel nacia kultura heredaĵo de Pollando kaj Kroatio.

La partoprenantoj povos ĝui en la programeroj de la samtempe okazanta Itala E-kongreso, al kiu aldoniĝis ankaŭ Unesko-Forumo.

Ni invitas ĉiujn Eŭropajn esperantistoj veni kaj partopreni – aparte tiuj el proksimeco kiel esperantistoj de Italio, Aŭstrio, Svisio, Slovenio, Kroatio, Hungario, Slovakio...

Detalaj informoj en antaŭaj numeroj de Eŭropa Bulteno kaj sur la paĝaro:

<https://kongreso2019.esperanto.it>

Zlatko Tišljarić, sekretario de EEU

TRI NOVAJ PARLAMENTANOJ DE EŬROPA PARLAMENTO –ESPERANTISTOJ

En Slovenio elektiĝis inter 8 slovenaj EP-anoj Ljudmila Novak, bona esperantistino, kiu jam antaŭ du mandatoj estis membro kaj tre bone kunlaboris kun EEU, pro kio ŝi fariĝis honora membro de EEU (https://eo.wikipedia.org/wiki/Ljudmila_Novak). Ŝi certe estos grava por nia estonta agado. La Redaktoro de EB faris kun ŝi etan intervjuon:



Estimata Eŭropa Parlamentanino Ljudmila Novak,

1. Ĉu vi havas iujn klarajn celojn, kiujn vi deziras realigi en ĉi tiu mandato? En ĉi tiu mandato mi volas aktivadi por la bono de Slovenio, tie kie estas eble, kaj subteni proponojn kiuj instigos evoluon, kunlaboron kaj prosperon de EU. Mi deziras ke la homoj ricevu konfidon je EU kaj ties agado. Tial mi aktivos por la homoj kaj ilia vivo. Mi havas kelkajn prioritatojn, sed mia aktivado dependos ankaŭ de tio en kiuj komisionoj mi iĝos konstanta aŭ anstataŭa membrino.

2. En kiu parlamenta grupo vi planas membri?

La partio „Nova Slovenio“ estas membro de la grupo de Eŭropa Popola Partio kaj logike mi aktivos ene de tiu grupo.

Eduardo Kozyra anoncis ke en Pollando du pliaj esperantistoj elektiĝis. Ili estas: Robert Biedroń (https://eo.wikipedia.org/wiki/Robert_Biedro%C5%84) kaj Ryszard Czarnecki (https://eo.wikipedia.org/wiki/Ryszard_Czarnecki). Elektiĝis ankaŭ Anna Fotyga / favora por Esperanto.

Zlatko Tišljar

TRIOPA ESPERANTO-KONGRESO EN MALAGO



Finiĝis la Triopa Kongreso de Esperanto kaj la novaj organizantoj preparas novan Triopan Kongreson, t.e. IFEF, Germanio kaj Pollando. Saĝa ideo! Mi deziras ĉion bonan al la nova LKK, kvankam ĉe la nordo la vetero estos malpli varma sed same etosa, pri tio mi konscias kaj deziras.

Kiel multaj el vi scias, ni kapablis kunigi ĉirkaŭ 180 homojn el pli ol 22 landoj en alloga konstruaĵo, kun la celo profiti la nombrajn prelegojn, komunan manĝadon, kaj tiel plu. Kiel membro de la LKK mi valoras nian longan kaj pezan laboron, ĉar ni kunsidis multajn fojojn ĉe oficejoj de la urbodomo, entreprenoj, hoteloj, kaj finfine ni elektis la t.n. Dioceza Domo, ĉe la Katolika Seminario de Malago, kie ni en bonega etoso, ĝuis la komfortajn dormoĉambrojn, salonetojn, salonegojn, terason, puran aeron, ktp. Mankis nenio por okazigi la ambician Triopan Kongreson.

Pri la invititoj kaj prelegantoj, elstaras: Margareta Zaleski-Zamenhof, pranepino de la kreinto de Esperanto, Ilona Koutny, profesoro de la Universitato de Poznano, Federico Gobbo, interlingvisto esperantologo, Seán O'Riain, juristo diplomato kaj doktoro per lingvapolitika tezo pri lingvo-planado en Irlando kaj Kebekio, Katalin Kovats, filologo kaj metodologo, diplomiginta pri esperantologio en la budapeŝta universitato ELTE. Dennis Keefe, usona instruisto, profesoro en la Universitato de Nankino (Ĉinio).

Ankaŭ menciindas esperantistaj homoj kiel David Galadí, naskiĝinta en Kordovo, fizikisto kaj astrofizikisto, José María Rodríguez, Advokato de la Hispana Ŝtata Administracio, Miguel Fernández, verkisto kaj poeto, aŭtoro kaj tradukisto de kelkaj poemaroj kaj noveloj, iniciatinto de la Lirikaj Festoj de HEF kaj Vivu la Teatro, ktp. Miguel Gutiérrez Adúriz, kemia Inĝeniero, aŭtoro de pluraj noveloj kaj la vortaro Amika, eksmembro de la Akademio de Esperanto, ktp, ktp. Ĉiuj partoprenis la Triopan kongreson per prelegoj, teatraĵoj...

Mencii ĉiujn partoprenantojn igus ĉi raporto enuan kaj mi preferas paroli pri diversaj momentoj, kiuj estas vere interesaj kun artistoj profeziaj kaj amatoraj, komikaj kaj dramaj, amuzaj kaj gloraj kiel "Concerto Málaga", grupo el 13 homoj, kies muziko translokigis nin en la ĉielon, aŭ Rocío Alba, malagana kantistino, kiu plenigis la salonon je beleco, dian aromon kaj romantikan muzikon. Ŝi kantis koplön, (poezia kunmetaĵo de kvar versoj oksilabaj, ĝenerale kun rimaj konsonantoj en la paraj versoj kaj sen rimo en la neparaj, destinitaj al kantado. Ŝi ankaŭ ludis la t.n. "Sevillanas" (Populara muzika kunmetaĵo, laŭ alterna ritmo de tri je ok kaj du per ok taktoj, kun kiu ĉi tiu danco estas akompanata. Pedro Carrillo, diplomiĝinto en drama arto, surprizis nin per bela komika spektaklo kun dancado kaj opera kantado, interalie. Maria Grazia Barboni, itala kantistino, kantis en diversaj momentoj kaj emociigis nin per belaj esperantigitaj mondkonataj kantoj.

Ne mankis teatro, ĉar la esperantista granda aktoro Saša Pilipović, ludis la teatraĵon Vivo de Galileo kaj la originalaj Ciganaj Kantoj, kiuj jam famas en Esperantio. La simpatia muzik-paro Kajto, kontaminis la etoson per ilia muziko kun novaj kanzonoj kaj kutima rideto akompanataj de diversaj musik-instrumentoj, brile ludataj.

Pri la ekskursoj, mi sentas min tre fiera, ĉar unue ni timis ke ni programis multajn ekskursojn, sed ĉiuj realiĝis kaj ĉiuj sukcesis. multaj grupoj da homoj ĝuis kelkajn promeandojn tra Malago, ekskurson al urboj Antekero, Rondo, Granado, Kordovo, Medina Azahara, Zafarraĵo kaj Botanika Parko. Mi dankegas la volontulojn, kiuj helpis nin kaj la respondeculojn de la Dioceza Domo, kiuj ĉiam estis pretaj helpi nin kaj aranĝi ĉion akurate kaj senprobleme. Por fini mian raporton mi ne povas forgesis la kernon de la Triopa Kongreso, ĉar la presidento de IFEF Rodica Todor proponis al ni ĉi gravan eventon "ĝuste por festi sian jubileon en la sama lando kie ĝi naskiĝis", kaj la evento iĝis neforgesebla kaj nekomparebla. Mi esperas ke ĉiuj fervojistoj kaj ceteraj geesperantistoj, ĝuos novan kongreson en Germanio.

Ángel Arquillos

INTERESA DEKLARO DE POLA DIPLOMATO



La berlina esperantisto Lu Wunsch raportis ke la pola ambasadoro en Germanujo Andrzej Przyłębski prelegis apud Berlino en "[diplomacia salono](#)" organizata de germana fonduso pri ekonomio.

Laŭ [tiu artikolo](#) en federacilanda retejo, titolita «Esperanto anstataŭ English» li faris «kuraĝan (kaj eble ne seriozan) proponon por transsalti la lingvan barieron»: «Se Britujo forlasas EU-n, ne plu estas kialo paroli la anglan. Anstataŭe

oni enkonduku Esperanton.»

Berto Schuman

ENKONDUKO AL E-KULTURO

Kadre de Cracow Language Teaching Staff Training Week, okazos intensa E-kurso por universitataj instruistoj de lingvoj el diversaj landoj, neesperantistoj, kiuj partoprenas Erasmus+ trejnadmoblecon por kunlaborantoj. La 20-hora kurso okazos de la 8-a ĝis la 12-a de julio 2019 ĉiutage. La organizanto estas la Jagelona Universitato (lingva centro). La titolo de la kurso estas: Enkonduko al la esperantaj lingvo kaj kulturo kulturo (Introduction to Esperanto Language and Culture). La kurson prilaboros kaj gvidos Maria Majerczak.

Priskribo de la kurso:

Lingvo: La partoprenantoj lernos bazajn sciojn kaj ekkonos la strukturon de la internacia lingvo.

Kulturo: La esperanta kulturo estos prezentita helpe de bildoj kaj mallongaj tekstoj, enhavantaj grandnombre internaciajn vortojn en Esperanto kaj elementojn devenantajn el la plej disvastigitaj lingvoj.

Estas invitataj personoj, kiuj parolas malsamajn lingvojn.

La oficiala formulaĵo kaj anonco estis faritaj de la universitato.

Maria Majerczak

PRI FUNGOJ EN KVINPETALO



Alain Favre, specialisto pri fungoj, denove gvidos promenadojn tra naturo kaj Vikipedio.

Kie? En la kulturcentro Kvinpetalo, en bela regiono Puatuo, Francio.

Kiam? de la 17a ĝis la 21a de junio.

Ĉiutage, matene aŭ posttagmeze laŭ la vetero, ni vizitos naturan medion - arbaron, herbejon, vojrandon, lag- aŭ riverbordon... kaj malkovros ĉefe plantojn, eble fungojn. Kaj interne de Kvinpetalo, ni determinos, iom studos pri botaniko kaj riĉigos Vikipedion per

informoj ligitaj al la renkontitaj estuloj.

Ja unuavide ambicia programo, sed ne timu: ĝi estas alirebla por ĉiuj! Pri restado, prezo, kaj aliaj teknikaj informoj, vidu ĉe <http://www.kvinpetalo.org>, rete: informoj@kvinpetalo.org
Bonvenon en Kvinpetalo!

Claude Nourmont

LA REVO

Multaj esperantistoj revas, ke iu ŝtato aŭ ŝtatoj enkondukos Esperanton en la lernejojn – ĉar per tio nia celo estus realigita. Sed ili ne povas kompreni ke tiu ĉi revo estas nerealigebla, ne pro tio ke decidantoj en ŝtatoj ne volas tion, sed pro du aliaj kaŭzoj:

1. Se iu ŝtato pretus fari tion, unua demando starigas: Ĉu ekzistas instruistoj por realigo de la plano? Oni devus havi plurcentojn da geinstruistoj en eta lando kaj plurmilojn en pli granda lando. Oni povas krei tiujn instruistojn, sed por tio estas necese krei en universitatoj studunuon kun adekvataj universitataj profesoroj, edukadi studentojn (se entute pretus tiom da gehjunuloj tion studi) dum pluraj jaroj kaj trovi budĝeton kiu kovros la kostojn. Kiu pagos tion? La ŝtata parlamento devus aprobi tion. Kial ĝi aprobu, se neniu povas klarigi kial tio estus grava por la koncerna lando? Dum unu kvarjara mandato iu grava politikisto neniel povas entrepreni tian enorman agadon kiu ne rilatas nur al unu decido sed al tuta aro da ĉirkaŭaj agadoj. Praktike utopio neniel realigebla. Cetere iu provo pri tio jam okazis. En Hungario estis kaj Universitato kie eblis studi kaj edukigi kelkdeko da novaj instruistoj, sed post dudeko da jaroj ĉio estingiĝis, la studo ne plu ekzistas, aktivaj instruistoj restis malpli ol 10.)
2. Oni ja instruis E-on en lernejoj je ĉiuj niveloj kaj je diversaj daŭroj en sufiĉe multaj landoj. Kaj kiaj estis la rezultoj? Katastrofaj. En neniu klaso estis kontentigaj rezultoj. La infanoj ne ŝatas lerni E-on en lernejo kiel ion devigan. Ĝi havas la saman efekton kiel pri aliaj fremdlingvoj. La infanoj ne havas motivon kaj ne havas sufiĉajn instruhorojn por havi rezultojn. Instrui en lernejoj signifas devigi infanojn kaj tute ne atingi deziratajn rezultojn. Ĉu iu konas aktivajn esperantistojn kiuj iĝis tio post lernado en elementa lernejo? Mi ne.

Sekve oni devas konstati ke tiu revo estas ne nur utopia kaj nerealigebla sed eĉ damaĝa, ĉar ĝi forŝovas la infanojn de tiu lernado, igas Esperanton malamata. Ĉu tamen estas iu solvo? Jes, sed pri tio mi verkos post la fino de la projekto Multlingva Akcelilo.

Zlatko Tišljar

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 31-an de majo 2019

Redaktoro: Zlatko Tišljar

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljar, Edvige Ackerman, Ángel Arquillos, Berto Schuman, Maria Majerczak, Claude Nourmont.

Kontakto: ztislar (ĉe) gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno>

